★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Bernard Bolzano (1781 – 1848)

Bernard Bolzano naskiĝis la 5an de oktobro 1781 en Prago. Li devenis el italo-aŭstra familio kaj verkis germanlingve. Dum tuta vivo li suferis precipe de fortaj kapdoloroj kaj ĥronika tuberkulozo. Kiel romkatolika pastro kaj univerzita predikanto, senkompata logikisto, malamiko de nacionalismo kaj militoj li kapablis laŭte pensi pri ekleziaj dogmoj kaj malgraŭ ke li ne havis fortan voĉon, li inklinigis al sia flanko junulojn kaj liaj predikoj fariĝis same popularaj kiel predikoj de Magistro Johano Hus antaŭ kvar jarcentoj. En liaj verkaĵoj malamikoj, kiuj lin fervore denuncis, trovis 112 herezaĵoj. En la jaro 1819 oni Bolzanon silentigis per malpermeso de predikado kaj li en vilaĝo Těchobuz ĝis fino de sia vivo diligente okupiĝis pri matematiko kaj logiko. En nia erao ni ne ĉiujn liajn pensojn akceptus. Ekzemple 25 jarojn antaŭ Karl Marx li en sia "Libreto pri la Plej Bona Ŝtato" ("Das Büchlein vom besten Staate") alvenis preskaŭ al sojlo de utopia komunismo. La 18an de decembro 1848 Bernard Bolzano forpasis kaj oni lin entombigis en Prago. Li ne estis ĉeĥo, sed signife influis ĉeĥan nacian renaskiĝon.
La prelego estos registrata.
**Prelegonto: Oldřich Arnošt Fischer**

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 18an de septembro 2024 je la 18-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- la 27an—29an de septembro 2024 Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Česká Třebová
- La 7an — 10an de novembro 2024 KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), Žilina
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno!

★

## Cetera programo en septembro

la 23-an **Speak Dating**. Moravské náměstí (zajišťuje Marek Blahuš)
la 25-an **Kion ni legas**, diskuto, rete per Skajpo
la 26-an **Co je esperanto** – Milan Kolka, MZK

## Programo en oktobro

la 2-an **Traduko de la gvidlibro** – Milan Kolka, klubejo
la 3-an **Tanzanie 2024** – Milan Kolka, česky, restaurace Siwa, Veveří 34
la 9-an **Arušo 2024** – Milan Kolka, Miroslav Malovec, rete per Zoom, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice
la 16-an **Anopluroj (pedikoj) kaj ekzantema tifo** – Oldřich Arnošt Fischer, klubejo
La 23-an **Nevidantoj kaj muziko** – Danijela Petrovič (RS), rete per Skajpo
la 30-an **Zdeněk Hršel** – Zuzana Hršelová, Miroslav Malovec, klubejo

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)